# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 2 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 2

Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12.


## Metodoj de ateista propagando en Sovetio

Ĉiuj metodoj kaj formoj de ateista propagando en nia lando dependas de tio, kiel konsideras sin la ateistoj mem, kiel konsideras ili taskojn de la ateista propagando.

Ĉiu laboristo-ateisto estas antaŭ ĉio laboristo, batalanto de l' Revolucio kaj ĉio, kion li faras, devas servi al la Revolucio, sekve ankaŭ la ateista propagando. La religia propagando tute ne apartiĝas en sia enhavo de politikaj problemoj; la religiuloj sub formo de religia agado kontraŭstaras revolucian kaj socialisman agadon enpenetrante ĉiujn flankojn de socia vivo. Pro tio, nia ateista propagando ĉiam estas kunligita kun aktualaj taskoj de politiko kaj socialisma konstruado, dependas de tiuj taskoj.

Nun estas periodo, kiam ni elektas por nova jaro sovetojn. (La artikolo estas skribita komence de decembro en pas. jaro) Religiuloj kaj influantaj ilin novburĝaro, celas malhelpi la aferon, sub religiaj formoj agitas kontraŭ sovetoj, penas ŝovi en listojn de elektotaj deputitoj taŭgajn por ili kandiatojn ktp. Nia Ateista Unio unue senmaskigas politikan esencon, kontraŭsovetan agadon de la religiuloj, due aktive partoprenas en la elektado mem, alvokante aliajn.

Vilaĝaj ĉeloj de Ateista Unio zorgas propagandi per okulvideblaj metodoj konstruante socialismajn elementojn en agrikultura vivo. Ekz. kelkaj ĉeloj organizas agrikulturajn eksperimentojn, modelajn kamparojn, kolektivajn agrikulturejojn, kooperativojn diversajn ktp.... La sukcesoj atingitaj per tio, ĉiu plibonigo per "ateista" konstruado en kamparana vivo estas uzata por ateista propagando. La rezulto de tiuj metodoj, kiuj plenumas ekonomiajn kaj politikajn taskojn de socialisma konstruado sen dio, tre bone efikas.

Ni konsideras, ke ateista propagando estas tasko de l'tuta soveta socio, ne nur de Ateista Unio. La lasta estas nur gvidanto en la afero. Pro tio niaj organizoj ofte aranĝas diversajn formojn de la propagando kune kun aliaj organizoj (sindikatoj, IRH ktp.). Ekz. en IRH-Tago ni kune aranĝas kun IRH vesperkunvenojn kaj spektaklojn pri la temo "Blanka teroro kaj religio". Dum internacitago de la kooperado ni kune kun kooperativaj organizoj propagandas kontraŭ pseŭdokooperado de la sektanoj ktp.

Nia propagando estas ĉiam amasa laŭ sia esenco kaj formo: amasaj raportoj, lekcioj, spektakloj kontraŭ religia kinofilmo, amasaj promenadoj, ekskursoj, karnavaloj ktp.

Por efektivigi tre grandajn taskojn ni bezonas preparitajn bone por tio ateistojn. Ĉiu ĉelo ateista aranĝas tiucele kontraŭreligiajn rondetojn en sia fabriko ktp. Pli supere starantaj ateistorganoj (konsilantaro) organizas seminariojn, kursojn por prepari bezonatajn raportantojn, lektorojn, gvidantojn de la rondetoj ktp.

Nia propagando estas efektivigita laŭ produktejsistemo. Ĉiu ĉelo estas organizata ĉe fabriko, ĉe administrejo ktp. Pro tio ni havas plej bonajn rezultojn, ĉar ni povas propagandi per lokaj materialoj, kunligi nian propagandon kun profesi-teknikaj problemoj, kun plibonigo de laborista morar- kaj materialestado. Pro tio ni sukcesas.

N. Incertov.

## Kvindek jaroj da kremacio en Germanio

Kvankam la kremacio en Germanio estas leĝe permesata de la jaro 1800, tamen la unua kremaciejo estis malfermata nur en jaro 1878. Je la deka de decembro de l' nomita jaro okazis la solena malfermo de la unua germana kremaciejo en Gotha (Turingio). La unuan kadavron, kiu estis cindrigata, oni devis eltombigi ĉar la mortinto inĝeniero Stier pioniro de la kremacimovado laŭtestamente deziris kremacion, sed li mortis antaŭ fino de la konstruado, li estis enbalzamigata kaj enterigata.

Hodiaŭ ekzistas en Germanio 88 kremaciejoj. En kuranta jaro oni konstruos ankoraŭ 15 kremaciejojn. Berlino havas tri kremaciejojn kaj baldaŭ havos la kvaran. Eĉ Langensalza, malgranda urbo kun 12 000 loĝantoj, posedas kremaciejon. Laŭ la statistiko okazis en 1893 251 kremacioj, en jaro 1913 10 174 kaj en jaro 1923 33 000. La ideo de la kremacio progresas.

## Geateistoj!

Aŭskultu kaj serioze priatentu la alvokon el Polio, la alvokon de samcelanoj el la lando, kie la liberpensula movado estas akre persekutata, kion plej evidente atestas tia fakto kiel aresto lastatempe de cent liberpensuloj en Zawada (Zavada; Malgrandpolio) pro kontraŭreligia manifestado sur stratoj de la urbo.

En unu el la plej klerikalaj urboj de Polio en la fortifikaĵo de obskurismo Lublin, kie estas sola en Polio katolika universitato kaj hebrea religieca supera lernejo, troviĝas kelkaj ateisto aktivaj, kiuj malgraŭ malfavoraj kondiĉoj decidis jam en la komenco de pasinta jaro eldoni liberpensulan enciklopedion en pola lingvo. La decido parte estas jam efektivigita, nome antaŭ du monatoj aperis sur la libromerkato la unua volumo de ĉi tiu enciklopedio (mendebla ĉe: Wydawnictow "Wolnomysliciel" Lublin (Polio) skr. poczt. 152 k K-do Kurt Hubricht, Mariannenstr. 22, Leipzig O 30, Germ. Sovetianoj mendu nur ĉe la lasta; prezo de unu ekz. 1 dol.

Enhavo de la unua volumo: Laika kalendaro; El la historio de kalendaro; Skiza historio de la ateismo; Bibliografio de liberpensaj verkoj en pola lingvo depost 1900; Nomaro de liberpensaj ĵurnaloj el la tuta mondo kun adresoj; Senkonfesieco; Laikaj geedziĝoj k eksedziĝo; Kremacio.

## Esperanto k Libera Penso

Sed, kiel ni jam antaŭe diris, la eldonaĵo estas nur parto de tio, kio estas de ni planita. Enciklopedio laŭplaĉe konsistos el kelkaj volumoj. Por ke ĝi estu riĉenhava kaj laŭeble kompleta, ni bezonas respektivan materialon. En Polio liberpensula literaturo estas mizera kaj tial ni turnas nin al vi, eksterlandaj K-doj, kun petego sendi al ni: 1. ateistajn, monistajn, liberreligiajn ĵurnalojn; 2. laikajn kalendarojn, katalogojn de liberpensaj libroj; 3. flugfoliojn, afiŝojn, kartojn, tabelojn, statistikojn, liberpens. insignojn; 4. librojn k broŝurojn pri- k kontraŭreligiajn, pri- k kontraŭateismajn; 5. liberpens. beletristikajn librojn ktp.

Se ĉiu el vi sendos ion el supraj aĵoj, ni povos nian planon sukcese realigi. Devo de ĉiu ateisto estas subteni nian entreprenon. Nur komunforte ni povos antaŭtempe ĉesigi malutilegan fiagadon de diverskonfesia pastraro k nuligi fiinfluon de religioj. Ĉiu do almetu sian briketon al komencita konstruo: Liberpensula Enciklopedio.

Por ĉio ni kore antaŭdankas.

Eldonejo "Wolnomysliciel".

## NIA POŜTO

**259.** — Kompreneble mi sendos informojn k materialon pri la afero. Laŭ mia opinio faras pli bonan impreson, se ni eldonas la gazetservon. Monon sendu per K-do B.

**1225.** — Karton ni ricevis. Dankon. Kunhelpu!

**Roosing jun.** Sendu specimenon de "Nova Kulturo".

**2798.** — Enciklopedion mi ekspedis registrite al Moskvo.

**Vaguloj.** — Poŝtajojn mi ricevis. Vidu "Liberpensula Paĝo" n-o 1. Salutojn k bondezirojn. Literaturo ruslingva alvenis de Brjansk Gorodskoj Sovet Sojuza Bezbojnikov. — Individuaj leteroj ne estas respondataj pro poŝtelspezoj k tempomanko.